

Bulgara **ESPERANTISTO**

V - 19479/47 (1948)





Esperantistoj el Odeso (USSR) post celebros de la naskiĝtago de d-ro L. L. Zamenhof. En la unua vico sidas la veterano de la soveta E-movado Naum Sigal

Redakta komitato:

Kunĉo VALEV (ĉefredaktoro), Nevena ALEKSIEVA, Marin BĂCEV, Ljuba BOJA-ĜIEVA, Dimitro DENĈEV, Dimitro HAĜIEV, Krăstu KARUCIN, Haim LEVI.

Korektis: Rajna Konstantinova
Sofio, poŝtkesto 66 Tel. 31-00-29

Abonkotizo de „Bulgara Esperantisto“ nur jara: por Bulgario — 2 levoj, por socialisma landoj — 3,80 levoj, por ĉiuj ceteraj — 4,16 levoj aŭ egalvaloro.

ENHAVO

* * *	La homaj rajtoj kaj Esperanto . . .	1
* * *	Dimitro Zlatarski 75-jara . . .	2
	Dimitro Zlatarski. Mia esperantista kredo	3
	Rajna Konstantinova. Nova Jaro . . .	3
	Jordan Atanasov. Simeon Baltaĝiev 75-jara . . .	7
	Cvjatko Todorov. Amiko de la paco . .	8
* * *	Titolitaj E-instruistoj . . .	8
	Rosica Georgieva. Pazarĝik post UK en Varno . . .	9
	Ilija Ivanov. Arangoj por neesperantista publiko . . .	9
* * *	Alvoko . . .	9
	Ĥr. M. Davo . . .	10
* * *	La Premio Sironchetti . . .	11
	Adolf Holzhaus. L. L. Zamenhof ne estis monavida . . .	11
* * *	Grava por filatelistoj . . .	12
* * *	Konstitucio de USSR (daŭrigo el n-ro 11) . . .	13
	Dimitro Haĝiev. Alloga bukedo . . .	14
* * *	Ricevitaj en la redakcio . . .	16
* * *	Distroj . . .	III
* * *	Tra la gazetaro . . .	III
* * *	Nekrologo: Katja Bojaĝieva . . .	IV

Sur la kovrilpaĝo:

La bulgaraj civitanoj entuziasme manifestas sian amon al la nova socialisma vivo, doninta al ĉiuj plej vastajn homrajtojn kaj liberecojn

UZINO „ELPROM“ — TROJAN

Malgranda pezo. Plialtigita sekureco. Plialtigita koeficiento de utila funkciado. Tio estas la avantaĝoj de la elektromotoroj de Uzino „Elprom“ — urbo Trojan.

La uzino liveras:

— unufazajn malsinkronajn elektromotorojn kun mallonge kunigita rotoro kaj alteco de la akso 71 mm;

— novan serion de trifazaj elektromotoroj 4 AO kun pezo malgrandigita ĉirkaŭ 15%.

La elektromotoroj de „Elprom“ — Trojan estas eksportataj al pli ol 70 landoj de la mondo.

Detalaj informoj kaj aferkontaktoj:

Uzino „Elprom“ — Trojan. Telekso 37532.

Eksportanto: „Elektroimpeks“ — str. Vaŝington 17. Sofio.



LA HOMAJ RAJTOJ KAJ ESPERANTO

Antaŭ 30 jaroj, je la 10-a de dec. 1948, la Ĝenerala Asembleo de UN akceptis la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj (UD). Per rezolucio de 1950 ĝi nomis la 10-an de decembro de ĉiu jaro Tago de la Homaj Rajtoj.

UD estas la unua internaci-jura dokumento pri homaj rajtoj, kiu emfazas la neceson de universala respekto de rajtoj kaj fundamentaj liberecoj de la homo kaj entenas ilian liston. Ili estas la elementaj rajtoj de la personeco: egaleco de ĉiuj homoj sen kiu ajn diferencigo, rajto je vivo, libereco kaj persona sekureco, rajto je sekureco de la honoro, reputacio kaj de la loĝejo, rajto de ĉiu homo je egala jura protekto de liaj rajtoj fare de senpartia tribunalo; la civilaj kaj politikaj rajtoj kaj liberecoj — rajto je ŝtataneco kaj azilo, rajto proprieti havaĵon, rajto je edziĝo, je libereco de penso, konscienco kaj religio, je libereco de opinio kaj esprimiĝo, de pacaj kunvenoj kaj asociiĝoj, universala kaj egala balotrajto per sekreta voĉdono; socialaj, ekonomiaj kaj kulturaj rajtoj: rajto labori kaj ricevi egalan kompenson por egala laboro, rajto je ripozi kaj socia sekureco, rajto formi kaj aliĝi sindikatojn, rajto je kleriĝo (edukado kaj je partopreno en la kultura vivo de la komunumo. La finaj tri artikoloj de UD rekonas, ke ĉiu homo rajtas je socia kaj internacia ordo, en kiu oni povas plene ĝui la rajtojn, enlistigitajn en UD.

La akcepto de UD spegulis la mondhistoriajn ŝanĝojn en la internaciaj rilatoj, rezultantaj el la kresko de la fortoj de demokratio, paco kaj socialismo. Senkonsidere al tiuj difektoj, UD estas senduba helpo en la batalo de la popoloj de la kapitalismaj kaj koloniaj landoj por rekono kaj respekto de la demokratiaj rajtoj kaj liberecoj.

UD havas karakteron de rekomendoj al la ŝtatoj. Sur ĝia bazo la Ĝenerala Asembleo de UN akceptis plurajn pliajn dokumentojn, kiuj vastigis aŭ detaligis ĝian signifon. Kelkaj el tiuj dokumentoj estas jure devigaj.

Dum la 63-a UK de Esperanto en Varno la Komitato de UEA akceptis laborplanon pri la celebrado de la 30-jara jubileo de UD. Laŭ tiu ĉi laborplano la periodo inter la 10-a kaj 17-a de decembro — do inkludanta la naskiĝtagon de la kreinto de E-o d-ro L. L. Zamenhof — estas proklamita kiel Semajno de la Homaj Rajtoj kaj E-o. La kunligo de la du datrevenoj ne estas hazarda. Ĝi estas tute logika kaj digna, ĉar la personeco de Zamenhof, liaj vivo kaj agado estas intime ligitaj kun la koncepto pri la homaj rajtoj. Per sia kreaĵo kaj agado Zamenhof ankaŭ kontribuis por la preparo de la grundo por akcepto de UD.

UD estas unu el la bazaj gvidaj dokumentoj por la laboro de UEA. Jam antaŭ ol ĝi ekzistis, UEA deklaris en sia Statuto, ke la „respekto de la homaj rajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo“. Tiu ĉi principo inkluzivas la ideon

de sendiskriminacia egaleco de ĉiuj homoj en maksimumo de ekonomia prospero, socia progreso kaj libereco. Sed UEA ne limigis sin al nura proklamado de la principo. Ĝi klopodis per ĉiuj disponeblaj rimedoj disvastigi ĉiujn humanecajn ideojn kaj apogi ĉiujn fortojn, kiuj celas influi eduke en la direkto de reciproka respektado de la popoloj. Jam kvaran fojon UEA organizas mondiskalajn kampanjojn kun la celo diskonigi la enhavon de UD, kuraĝigi la observadon de la homaj rajtoj, aparte atentigi pri la kulturaj rajtoj de la moderna homo kaj reliefigi la principon de lingva egaleco. UEA ankaŭ kontribuis al pluraj aliaj kampanjoj de UN kaj UNESKO, kiuj rilatas al la homaj rajtoj, ekz. al la Jardeko de Aktivado por Kontraŭbatali Rasismen kaj Rasan Diskriminacion.

Pluraj dokumentoj pri la homaj rajtoj aperis en E-o. En 1976 UN mem eldonis represon de la esperantlingva traduko de UD, kaj en 1977 UNESKO aperigis en E-o la Rekomendon pri Edukado por Internacia Komprenigo, Kunlaboro kaj Paco kaj Edukado rilate al Homaj Rajtoj kaj Fundamentaj Liberecoj.

BEA, kiel landa asocio de UEA, partoprenis en ĉiuj kampanjoj, rilataj al homaj rajtoj. La bulgaraj e-istoj estas fieraj, ke en nia socialisma patrujo ĉiuj homaj rajtoj, proklamitaj en UD, estas plene observataj kaj disfloras en nia nova vivo. Ili estas enskribitaj en kaj garantiitaj de la Konstitucio de Popola Respubliko Bulgario. La bulgaraj e-istoj estas fieraj, ke nia lando donas senĉese sian kontribuon por forigo de la rasa diskriminacio, por likvido de la koloniismo, por konservo de la paco kaj por kreo de tia socia kaj internacia ordo, en kiu ĉiuj homoj povos ĝui ĉiujn homajn rajtojn kaj liberecojn.

DIMITRO ZLATARSKI 75-JARA

Li naskiĝis en Varno en 1903 j. Tie li lernis, poste dum 36 jaroj estis instruisto en diversaj vilaĝoj. Frue li akceptis la progresemajn ideojn kaj eniris la revolucion movadon en nia lando.

Esperantisto li estas de 1919 j. Lia gimnazia amiko Kojuharov, la butikisto Bačvarov kaj la apotekisto Milčev estis la unuaj homoj, kun kiuj li ekparolis en la Internacia Lingvo, lernita de li nur dum ne pli ol unu monato. La amikeco de Zora Mladenova kaj Ivan Dimčev — Hans, de Elisaveta Begajeva k. a. donis multon al liaj unuaj provoj en la E-poezio. Atanas D. Atanasov — ADA aprobis kelkajn versaĵojn kaj ili aperis en „Bulgara Esperantisto“ sub la pseŭdonimo Miti. D. Zlatarski faris plurajn

tradukojn el la bulgara poezio, bone konatajn al la malnova generacio de e-istoj. La revolucia temo okupas apartan lokon en lia originala verkaro. Sian lastan versaĵon, ĉi-tie presitan, li dediĉas al Asen Grigorov danke pro ties intereso kaj multjara helpo al li sur la poezia kampo.

Larĝa korespondado kun e-istoj el ĉiuj kontinentoj vastigis lian kulturen kaj politikan horizonton. Kiel ĉefan rezulton de tiuj vastaj internaciaj kontaktoj oni devas menciigi la konatiĝon kun kelkaj interesaj, spirite riĉaj homoj, kies amikeco estis por li instigo al plikleriĝo kaj sindona laboro. Zlatarski okupiĝis pri natursciencaj studoj, pri historio, etnografio, folkloro kaj popolaj dialektoj en la regionoj, kie li loĝis kaj laboris. Li fondis riĉan arkeologian muzeon en u. Dalgopol, distrikto de Varno. Gis nun li estas direktoro de tiu ĉi muzeo.

Persekutate dum la kapitalisma reĝimo pro siaj ideoj, Zlatarski ne ĉesigis sian klerigan laboron en kulturkluboj. Li organizis teatrajn spektaklojn kaj mem partoprenis ilin, prelegis, liveris progreseman literaturon al popolaj legejoj. Post la liberiĝo el la faŝismo li okupis gravajn postenojn en la loka ŝtata kaj kultura vivo. Pro lia sindona populutila agado li estas kelkfoje honorita per ordenoj kaj posedas la altajn honortit



MIA ESPERANTISTA KREDO

Al Asen Grigorov

Internacia lingvo — bela revo
de l' homoj — estas nun realo.
Sed lingvo ne sufiĉas — nia devo
nun estas fari ĝin armilo ŝtala.

Ne taŭgas pacifismo utopia!
Nun stari ekster lukto estas krimo —
dum ni senpolitike fantazias
milito rabas milojn da viktimoj.

Amikon havis mi en land' korea,
kaj eksilentis li post la milito.
Ĉu falis Kim sub la standard' armea?
Aŭ hejme trafis lin obusa splito?

Kun Vanda — pola amikin' — nin ligis
gefrataj koraj sentoj, sed faŝistoj
turmentis ŝin kruele kaj pendigis.
Do mi etendu manon al murdistoj?!

Leteron vi atendas de amiko
el Hanoj, el Santjago, Rodezio. . .
Li mortis sub la nigra sun' afrika,
sub sanga sun' vjetnama aŭ ĉilia!

Kun verda stelo eble iu bruto
nun pafas kontraŭ avoj en Libano;
knabinojn perfortitajn ekzekutas,
bruligas per napalmo la infanojn.

Ho ne, neniam nomu vin gefratoj
de la krimuloj kontraŭ vivo paca,
de la faŝista best' revivigata,
de predikantoj de neŭtronminaco!

Kaj ne forgesu: besto restas besto,
kaj kia estus li „samideano“?
Ni manon fratan nur al man' honesta
etendu trans landlimoj, oceanoj.

Nun nia cel' tutmonda paco estu!
Kun pacobatalantoj ni parolu,
kreskigu la indignon kaj proteston,
el ĉiuj voloĵ forĝu unu volon.

Kaj tiu volo, tiu forto granda
pli firme la banditojn kontraŭstaru!
Jes, tiel la ideo Esperanta
reale faros servon al homaro.

9.9.1978

tolojn „Merita Instruisto“ kaj „Popola Kulturganto“.

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ sincere gratulas la E-poeton D. Zlatarski lige kun lia 75-jariĝo kaj esprimas elkorajn bondezirojn por plua multjara vervoplena kaj produktiva vivo kaj persona bonfarto! Kaj ankoraŭ: ke liaj lasttempaj versaĵoj „Mi marŝas kaj marŝas“ kaj „Mia esperantista kredo“ ne restu la lastaj!

NOVA JARO

Al mia korfratino Marjorie
Bo lton, kiu la unua kura-
ĝigis min verki

Ĉiujare en la lastaj tagoj de decembro la bazarplacoj de la urboj kovriĝas per provizoraj pavilonoj kaj eksterbutikaj surtablaj vendejoj, plenaj je frandaĵoj, ludiloj, libroj kaj aliaj allogaĵoj. La vendistoj gaje krietas, laŭdante siajn varojn, kaj frostas frostiĝintajn manojn, saltetante de unu kruro sur alian. La freŝe frosta aero estas plenigita je homa bruparolo kaj odoro je pinbranĉetoj. La infanoj ravite staras antaŭ la pitoreske ornamitaj „survaknicioj“¹. En tiuj tagoj en mia konscio neeviteble elnaĝas la rememoro pri unu pura, blanka vintrotago — novjara tago en la fora infaneco. Neniu alia rememoro pri feliĉaj aŭ tristaj Novaj Jaroj estis ĝis nun, en daŭro de duonjarcento, en stato forpeli tiun rememoron, aŭ eĉ nur ĵeti ombron sur ĝin. . .

Estis antaŭ kvindek jaroj — kia komika kaj terura cifero! Kvindek jaroj — sed kie ili estas? Ĉu ili ekzistis? Kien ili forflugis? Ili certe ekzistis — pri tio atestas miaj elkreskintaj infanoj, la sulkoj sur mia vizago kaj multaj, multaj aliaj aferoj. Sed tiu duonjarcento per nenio malpliigas la helan kaj dolĉamaran rememoron.

Nova Jaro! Ĉiam kun gajaj emocioj kaj multaj esperoĵ atendata de mia infana koro! En malriĉa dometo loĝis ni — kvar fratinoj kaj nia povra patrino. Ne plu estis inter ni paĉjo, mia frato kaj unu fratineteto — ili jam delonge estis mortintaj. Ne estis inter ni ankaŭ la plej juna fratineteto Miĉe — ŝi loĝis ĉe aliaj „gepatroj“, en riĉa domo. Mi estis okjara, kaj la

¹ „Survaknicio“ — kornusbranĉeto, speciale ornamita, per kiu laŭ popola kutimo en la Tago de Novjaro infanoj frapetas la dorson de plenaĝuloj, eldirante bondezirojn.

pli juna fratineto sesjara. La du pli aĝaj fratinoj lernis en gimnazio.

Kiel ĉiam je la Nova Jaro panjo vekis nin frue. Ni gaje gratulfrapetis per kornusbranĉetoj la dorsojn de panjo kaj de la fratinoj. Vestitaj en niaj malnovaj, eluzitaj manteletoj, kun ŝuoj pli grandaj ol niaj piedoj, kun lanaj ŝaloj ĉirkaŭ la kapoj, ni rapide kaptis la preparitajn de panjo saketojn kaj la kornusbranĉetojn kaj gaje forkuris eksteren. Grave estis ne nur viziti parencojn kaj konatojn, sed esti laŭeble „poleznik“².

Kiam ni eliris, sur la stratoj kuris jam aliaj fruvekiĝemaj infanoj, pelataj de la deziro esti „poleznik“. Ni vizitis multajn familiojn. Afable ridetante ties anoj pacience atendis sian vicon. Ni frapetis iliajn dorsojn per la kornusbranĉetoj kaj kantvoĉe ripetadis: „Sŭrva, sŭrva godina!“³ La senco de tiu tradicia bondeziro estas proksimume jena:

Feliĉan, feliĉan jaron!

Gajan jaron!

Viglaĵ, sanaj dum ĉi-jaro,
dum ĉi-jaro kaj eterne!

Dum la Novjara Tago ĉiuj estis bonanimaj, malavaraj. La riĉaj „labor-donantoj“ de panjo, al kiuj ŝi post la morto de paĉjo ĉiusemajne lavis la tolaĵon, esperis per bagatelaj bonfaroj elaĉeti por si la dian favoron por la tuta jaro. . .

Ekstere jam mateniĝis. Kia ĉarma vintra tago! Kaj kiom da neĝo! Neniam antaŭe kaj poste mi vidis tiom da neĝo. Laboremaj dommastroj estis forŝovelintaj ĝin ambaŭflanken de la strato, por ke la infanoj kaj la gaje tintantaj faetonoj povu senembarase moviĝi. Eble ĉar mi estis eta infano, la neĝamasoj estis duoble pli altaj ol mi. . . Ni rapidis, gaje ŝovadis manojn en la saketojn kaj eligis ĉu bombonon, ĉu krakenon, ĉu kikergrajnon. Kiom ili bongustis! La preĝejaĵ sono-

² „Poleznik“ — unua vizitanto je la Nova Jaro, kiu ricevadis donace arĝentan moneron.

³ Surva, surva godina (mallongigite de „sŭrova“) — feliĉa jaro.

rilegoj majeste anoncis la feston — egale amatan kaj atendatan de ĉiuj homoj dum ĉiuj epokoj, senmortan kiel la kornusbranĉetoj, kiuj estis simbolo de hela revo kaj espero. . . Varme kaj agrable estis en mia animo. Forgesita estis la mizero — konstanta kuniranto de nia orfa infaneco. Hejme atendis nin rostita viando, freŝa pano kaj novjara tavolkuko ene kun kornusburgonoj, ĉiuj kun difinita signifo pri allogaj perspektivoj. . . Ja per la fingroj estis nombrataj la tagoj dum la tuta jaro, je kiuj panjo povis permesi al si prepari tian „luksan“ manĝaĵon.

Ni estis vizitintaj jam ĉiujn parencojn kaj konatojn en la centro de la urbo. Nun ni rapidis hejmen por varmigi nin, tagmanĝi kaj fari la lastan viziton — al la afabla onklino Vesa, kiu ĉiam donacis ion belan kaj utilan al la orfoj de sia fratino. La tago estis ĉarma, eĉ nun ĝi brilas en mia memoro, kun siaj puraj neĝamasoj, el kiuj la sunradioj eligis milojn da diverskoloraj faireroj, kvazaŭ ĝi estus miksitaj kun etaj diamantoj. . .

Kiam ni gaje eniris la varman ĉambron, al ni ekodoris pinbranĉetoj kaj bakita viando. Hmmm. . . kiom apetitveka! Sur la malaltan larĝan liton, kiun ni ĉiuj dividis, nun estis metitaj du puraj tukoj, sur kiujn ni elŝutis la enhavon de niaj saketoj. Ho, kia abundo! Unue ni apartigis la „donacetojn“ — ili estis volvitaj en maldika papero, riĉe ornamita per avoj Frostoj, pupoj, fruktoj. Kaj la poluritaj groŝetoj! Kiam en la vivo ni vidis tiom multe da moneroj kune! Kompreneble, ilin ricevos panjo, sed nun, por mallonga tempo, ili estis niaj, gajnitaj per duontaga ripetado de la bondeziro „Surva, surva godina!“ Mi kaj mia fratino havis ankaŭ po unu pura arĝenta monero — ja ni sukcesis en du familioj esti „poleznik“. Malavare ni donis ĉion al panjo. Poste ni komencis eligi en apartaj amasetoj la diversajn frandaĵojn: bonodoraj mandarinoj, volvitaj en pitoreska



pakpapero el foraj landoj kun stampitaj sur ĝi kameloj kaj palmoj, mieloplenaj karoboj, surŝutetitaj per sezamo ringformaj krakenoj, molaj roz- kaj blankkoloraj bombonoj, grandaj molaj „istanbulaj“ kikergrajnoj, ĉokoladetoj kun mirindaj bildoj de ursoj, sciuroj, leporoj, kapreoloj. . . Estis ankaŭ sekigitaj vinberoj, figoj, bananoj. Sed tamen plej gravaj estis la donacoj: buntaj naztuketoj, libroj, kraĵoj, ligna kalkulilo kun nigraj kaj ruĝaj globetoj, bonodoraj rozkoloraj gumviŝiloj kaj pupeto, kiu krias „Mama“ — kun stampo „Bakiŝ“. Ah, kaj kio estas tio? — Malgranda objekto, volvita en silka papero. Mi senpacience malpakas. . . Paro da orelingoj! Grandaj, bluaj framboformaj globetoj kun ladaĵ fiksiloj. Tiam mi ne pensis, ke tio ne estas konvena donaco por infano, kaj ege ĝojis. Mi ornamis min per ili, por fanfaroni antaŭ la onklino.

Varmiĝintaj, sataj, ripozintaj, ni ekmarŝis al la onklino. La suno ne plu brilis, ia griza mallumo sterniĝis super domoj kaj arboj. Ni supreniris la krutan straton, pasis inter la ejoj de la fajrobrigado kaj eliris al la „rondira fervojo“, troviĝanta en la sino de la t. n. „Ilčov Bair“ (Ilčov-monteto). Tiu fervojo priservis la bierfabrikon. En la griza aero flugis unuopaj neĝeroj, kiuj rapide digelis sur niaj varmaj vizaĝoj. Iu fajrobrigadisto, nia najbaro, alkriis:

— He, infanoj, kien? La neĝo surkovros vin!

— Ni iras al onklino Vesa! — mi kuraĝe respondis, sed mia koreto tremis. . .

La neĝeroj rapide densiĝis, pli-grandiĝis, gracie dancis antaŭ niaj okuloj. Ne estis tre malvarme. Nur la grandaj blankaj neĝeroj, similaj al fabela vualo, ŝvebis en la aero kaj kvazaŭ falis ne el la ĉielo, sed leviĝis supren el la tero. Ĝi ekstaris kiel muro antaŭ miaj lacaj okuloj. Mi trenis mian fratineton, kiu ne plu povis marŝi tra la dika jam neĝo.

Jen mi ekvidis nigran dornan plekto-barilon. „Ha, ja tio estas nia vitĝardeneto! — mi gaje ekpensis. — Jen la alta juglandarbo. Ĝi ŝirmos nin, ĝis la neĝo ĉesos fali. . .“ Ankaŭ la fratino kuraĝiĝis, kaj enŝoviĝante en la neĝon ĝis la genuoj, ni atingis la „oazon“, sidiĝis sur la lanugmolan neĝon kaj apogis nin al la arbo. „A-a-a-h! Kiom agrable!“ — mi kun granda faciligo ekflustris. Proksime, tre proksime, tie malsupre, en la fundo, videbliĝis kovritaj de dika neĝo arboj kaj dometoj, el kies tegmentoj serpentumis supren varma fumo. Mi vidis la dometon de onjo, aŭdis la gajan bojadon de la fidela Ŝaro, kiu ĉiam de malproksime rekonis nin. . . Se ni nun rulfalos de la fervojo, ni troviĝus rekte antaŭ la pordo de onjo. Ŝaro lekos per sia varma lango niajn frostiĝintajn vizaĝojn, onjo malfermos la pordon, plaŭdos la manojn kaj diros: „Ah, infanoj, kiel vi kuraĝis ekmarŝi en tia neĝo! Eniru rapide!“ Ne, mi ne povis ekmoviĝi. Miaj okuloj fermiĝis beate. . . Ni estis en varma ĉambro. Kiom agrable! Sed kial panjo deziras veki min kaj krias: „Infanoj, rapide leviĝu!“ Ne, ne estas ŝia voĉo, eble paĉjo krias. . . Mi pli oportune apogas mian kapon sur la blanka, lanuga kuseno. Panjo estas super mi. Ŝi vokas: „Vekiĝu, Rajnjo, Rajnjo! . . .“ Ne, ŝi ne vokas, ŝi mallaŭte kantas: „A-a-a! A-a-a! . . .“ Mi estas eta infano, malpeza kiel neĝero. Miaj okuloj estas fermitaj, sed mi vidas tra la palpebroj la tristajn bluajn okulojn de panjo, kiu kantas kaj ploras. . . Mi deziras diri al ŝi: „Ne ploru, panjo, mi estas tiel agrable laca. . . Lasu min dormi!“ Grandaj neĝeroj flugas en la aero. Ne, ne estas neĝeroj, sed papilioj. Unu el ili prenas min sur siaj flugiloj kaj portas min. . . La voĉo de panjo daŭre sonas: „A-a-a! A-a-a! . . .“

Subite mi eksentas, ke oni metas min sur malmolan liton. Iom post iom mi eksentas frotadon sur piedoj, manoj, vizaĝo, ekflaras amoniakon, sed

kvazaŭ per fremdaj sensoj... Iu monotone ripetas: „Malfermu la okulojn! Malfermu la okulojn!“ Kun granda streĉo mi levas la palpebrojn. Tuj super mia vizaĝo mi vidas grizajn okulojn malantaŭ grandaj okulvitroj, grasan ruĝan vizaĝon, ŝvitkovritan frunton. Mi rekonas lin — tio estas la maljuna veterinaro, kiu loĝas ĉe la fajrobrigado kaj priservas ties brutaron kaj ĉiujn infanojn de la Kruta Strato, kies vundojn li purigas per oksigen-akvo, ŝmiras ilin per iu flava balzamo, bandaĝas kaj... ili mirinde rapide sanigas...

Kiam lia rigardo renkontas la mian, lia vizaĝo sereniĝas, li kun peno levas sian rigidiĝintan kapon, ekĝemas „O-o-o-h!“, metas la manojn sur la lumbon, frotas ĝin kaj elparolas: „Dank'al dio! Ŝi reviviĝis!“ Iu ekploras apud mi, kaj tuj kliniĝas super min la milda, turmentita vizaĝo de panjo, ĉiam ankoraŭ volvita en lana ŝalo, sur kiu kiel perloj briletas degelitaj neĝeroj. Mi ĉiam vidos ŝin tia: ĉielbluaj okuloj, dronantaj en oceano da ĉagreno, kuntiritaj en dolora grimaco lipoj, kiuj jam delonge malkutimiĝis rideti... Panjo heziteme karesas mian vizaĝon per siaj ruĝaj pro konstanta lavado, molaj manoj. Mi deziras rideti al ŝi, sed la vizaĝo, la lipoj, kvazaŭ ne estas la miaj. Kiu scias — eble mi sukcesas rideti, ĉar ŝi rapide krucsignas kaj ekflustras: „Dankon al vi, sankta Dipatrino! Dankon al vi, sinjoro doktoro!“ Iom akre, por kaŝi sian emociiĝon, la veterinaro diras: „Pro kio vi dankas al mi, danku al vi mem, ke vi ekiris por serĉi la infanojn! Ni vidis ilin, sed ni supozis, ke ili sukcesis atingi la onklinon, kies domon ili efektive preskaŭ atingis!...“

Oni transportas ankaŭ min hejmen, kie jam troviĝas la fratineto. Ŝi ne

estas tiom frostiĝinta, ĉar oni trovis min kovrinta ŝin per mia korpo, kion mi certe faris senkonscie...

La unua, kion mi eksentas, estas forta, akra doloro ĉe la orelopintoj. Mi tuŝas ilin kaj ekpalpas la bluajn orelingojn, kies ladaĵ fiksiloj premas la orelojn kiel tenaĵoj. Mi ekĝemas. Panjo rapide proksimiĝas. Mi ne scias, kion ŝi vidas, sed ŝi ekĝemas: „Ho dio mia, ja ili enpikiĝis en la orelojn!“ Rapide ŝi sendas unu el la fratinoj por la veterinaro. Li tuj venas. Malrapide, atente, la bona homo larĝigas la fiksilojn kaj deprenas la orelingojn kune kun la haŭto. Elbuŝigante ian anatemon ĉe la aspekto de miaj oreloj, li diras al panjo: —Forĵetu tion en la rubkeston!

Kiom da tempo mi kaj mia fratino kuŝis hejme, mi ne plu memoras. La flava balzamo de la veterinaro baldaŭ resaniĝis miajn orelojn. Al mi ŝajnas nun, ke tiu tempo estis la plej feliĉa periodo de mia infaneco, senigita je ĝojo! Venis parencoj, eĉ iuj de la „sinjorinoj“, ĉiu kunportis ian frandaĵon, ĉiu balancis la kapon. „Povraj infanoj, ili apenaŭ ne fariĝis viktimoj de la blanka morto...“ Eĉ en la loka gazeto aperis mllonga sciigo pri tio.

Ĉarma kaj trista Novjaro de 1928 — blanka, kun multe da neĝo, saturita de ĝojo, doloro kaj espero! Neniam mi forgesos vin! Kaj ĉiujn Novjarojn, kiujn mi ankoraŭ travivos, mi vidos tra via fabela prismo. En la fora infaneco ĝi montris al mi en daŭro de kelkaj horoj galerion da vizaĝoj kaj karakteroj, inter kiuj, kvazaŭ ĉirkaŭita de aŭreolo, ĉiam brilos la pala, sanktulina vizaĝo de panjo, kaj la ruĝa, grasa vizaĝo de la bonkora veterinaro, kiu per sia flava balzamo sanigis la vundojn de la infanoj el la malriĉula Kruta Strato.

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ legantoj! Sanon kaj feliĉon por ili, pacon kaj amikecon sur la ero, novajn venkojn de Esperanto!

gratulas la Novan Jaron al siaj multnombraj kaj amikecon sur la ero, novajn venkojn de



Mia bona amiko Simeon Baltaĝiev (Monkata) estas interesa homo kun tre varia, enhavoriĉa vivo. Li naskiĝis en 1908 en Sofio, sed la pli granda parto de lia vivo forfluis en Bjala, kie li loĝas ankaŭ nun.



Kun Monkata mi konatiĝis jam antaŭ la 9 de septembro 1944. En Bjala li havis propran librovendejon kaj presejon, super kiuj interesiĝe brilis la vorto „Esperanto“. Tiam, en daŭro de 11 jaroj, li eldonis malgrandan ĵurnalon „Niva“ (Grenkampo).

Kiel instruisto mi aĉetadis de li ĉion necesan por miaj lernantoj, kaj ni bone konatiĝis, parolante ĉiam en E-o. La Internacian Lingvon li lernis en 1927 ĉe la malnova e-isto Sava Altimirski. Poste estiĝis unu

el la fondintoj de la loka E-societo „Paco“. Komence ĝia prezidanto estis Altimirski, poste, multjare, Baltaĝiev.

Ĝis nun Simeon gvidis multege da E-kursoj en la gimnazio, en „Narkoop“ (Popola Kooperativo), en la Junpionira Domo kaj aliloke. Por E-o kaj per E-o li laboris kaj ankaŭ nun laboras fervore, abnegacie pli ol kvindek jarojn. Vaste li korespondis kun eksterlando, vizitis ĉiujn bulgarajn E-kongresojn, partoprenis ankaŭ en kelkaj universalaj — en Vieno, Budapeŝto, Kopenhago, Ateno.

Dank' al E-o Baltaĝiev havas multegajn amikojn tra la mondo. Kelkaj jam gastis ĉe li en Bjala, li gastis ĉe iuj.

Baltaĝiev posedas tre aktivan naturon kaj diversflankan talenton. Li verkis multajn versaĵojn, humuraĵojn, esojn, kiuj estas dissemiĝintaj en ĵurnaloj kaj revuoj. Ĉi-jare aperis kolekto de liaj verkoj sub la titolo „Lumo“.

Baltaĝiev manifestiĝis ankaŭ kiel artisto kaj reĝisoro. Kiel aktoro en amatora teatra trupo ĉe legejo „Trudoljubie“ (Laboramo) li kreis pli ol 400 figurojn sur la sceno. Mi aparte bone memoras lin en la komedio „Dio absolvu mian onklinon“, en kiu ankaŭ mi rolis (1943 j.). Kune kun li partoprenis ankaŭ liaj edzino Veska kaj filo Danĉjo.

Kiel ĵurnalisto Baltaĝiev aktivis multe sur la paĝoj de ĵurnaloj „Niva“, „Svetlostroj“, „Dunavska Pravda“ ka. sub la pseŭdonimoj Monkata, Simbalt ka.

En 1975 j., pro sia popolutila diversflanka kulturagado li estis honorita per alta ŝtatorдено — „Kiril i Metodi“ I grado.

Ni bondeziras al nia fervora samideano kaj amiko Simeon Baltaĝiev vivi ankoraŭ longe kaj aktivi kun ĉiam juna koro sur la E-kampo.

Jordan Atanasov

Niaj aktivuloj

AMIKO DE LA PACO

— Ĉio komenciĝis ekde la aŭtuno de 1961, — rakontas Petro Nenov. — Sur la uzina pordego mi vidis mane skribitan afiŝon, ke oni malfermas kurson de la internacia lingvo E-o. Antaŭ ĝi haltadis multaj laboristoj, kun intereso legis la anoncon, sed poste svingis manon kaj foriris, ĉar ili neniam aŭdis pri tia lingvo kaj ĉefe pro tio, ke simila afero ne estus por iliaj kapoj.

Sed Petro Nenov ne rezignis. La sekvan tagon li iris al la librotena fako, kie de-

vis komenciĝi la kurso. Tie jam atendis aliaj dezirantoj lerni la novan lingvon — Liljana Ĉolakova, Borka Mirkova, Ivan Ĉonov ka. Inter ili sidis nekonata virino, mezaĝa. Jen ŝi ekstaris kaj komencis paroli kun mallaŭta, kvietita voĉo pri E-o — lingvo de paco kaj amikeco inter homoj kaj popoloj en la tuta mondo. Ĝi estas lingvo facila kaj ĝin povas ekregi ankaŭ laboristoj. Si instruos tiun lingvon al la novaj kursanoj. Kiu ŝi estas? Petro kaj kel-

kaj aliaj ne konis ŝin. Si prezentiĝis: Na-
deĵda Konjarska, multjara instruistino en
Sumen.

La afero ekmarŝis. La unuajn lecionojn
Petro asimilis tre bone. Li aĉetis vorta-
rojn, abonis la revuon „Bulgara Esperan-



kistoj kaj la inĝenieroj. Iom poste oni elek-
tis lin sekretario de „Progreso“.

Jam tri jarojn Petro Nenov estas prezi-
danto de tiu societo, en kiu li antaŭ 17 ja-
roj pagis la unuan membrokotizon. Mal-
facilaĵoj ekzistas. La membroj estas disse-
mitaj en ĉiuj fakoj, multaj el ili laboras en
alternaj grupoj, estas okupitaj ankaŭ en
aliaj organizaĵoj. Nenov mem estas sur-
ŝutita de oficaĵ kaj sociaj devigoj. Sed por
la komunisto, por la konvinkita pacamiko
kaj fidela esperantisto ne ekzistas neven-
keblaj baroj. Bone laboras en la societa
estraro Evtimija Spirova, Rangel Gonev,
inĝ. Liljana Anĉeva ka. Helpas la societon
la uzinaĵ partia kaj sindikata komitatoj.
La uzinaĵ e-istoj jam trovis sian lokon,
akiris socian aŭtoritaton. Ilia korespondado
kun sovetaĵ e-istoj kreskas pli kaj pli.
Bonajn kontaktojn ili havas kun la e-istoj
el Liberec kaj Mlada Boleslav (Ĉeĥoslova-
kio). Multiĝas iliaj geamikoj ankaŭ en
aliaj landoj. Nedelonge kelkaj el ili —
Petro Nenov, Nadja Mladenova, Sijka
Hristova, Mitko Ivanov — partoprenis in-
ternacian E-renkontigon en u. Debrecen
(Hungario), ĝemela al Sumen. Tio estis ta-
goj de sincera amikeco kaj neforgesebla
ekskurso tra la frata socialisma lando.
Reveninte, tre kontenta pri ĉio vidita kaj
travivita, Petro Nenov deklaris:

— Mi jam propraspekte konvinkiĝis, ke
E-o estas lingvo, kiu malfermas fenestron
al la mondo. Ĝi proksimigas la homojn en
ilia nobla laboro por internacia amikeco kaj
en la batalo por tutmonda paco. E-o pli-
riĉigas la konojn de la homoj pri iliaj lan-
doj kaj popoloj, plivastigas ilian spiritan
horizonton. Samtempe ĝi donas grandan
personan ĝojon al siaj adeptoj. E-o meritas
ĉian helpon kaj kuraĝigon. Ni plenforte
daŭrigos nian laboron por ĝia plua dis-
vastigo en nia uzino, en nia urbo.

Cvjatko Todorov

tisto“. Lia strebo estis neniam foresti de
lecionoj. Li skribis sian unuan leteron. Kaj
la respondo ne malfruis. Lia nova leter-
amiko el Danlando skribis, ke li estas fe-
liĉa korespondi kun e-isto el Bulgario —
lando de la rozoj, patrolando de Georgi
Dimitrov. La revo de Petro Nenov reali-
ĝis: li jam havis amikojn trans la limoj.

Samtempe Petro aliĝis al la uzina E-
societo „Progreso“, fariĝis ĝia aktivulo.
Kune kun Asen Doĉev, Ilija Andreev,
Rajna Stanĉeva, Radenko Iliev ka. li
komencis popularigi E-on inter la tekni-

TITOLITAJ E-INSTRUISTOJ

En sia kunsido de 13 de novembro jk. la Buroo de CE de BEA konforme al la Regu-
laro por Aljuĝo de Titoloj al E-Instruistoj, art. 2 kaj 3, decidis doni honortitolojn al E-inst-
ruistoj kun multjara pedagogia aktiveco, kiuj distingiĝis per sia modela laboro kiel kursgvi-
dantoj kaj edukistoj. Jen la titolitoj:

A. Elstara Lektoro

1. Simeon Ĥesapĉiev — Sofio
2. Radoslav Triĉkov — Vraca

B. Rekonita Lektoro

1. Jordan Angelov — Sadovo
2. Petko Arnaudov — Pazarĝik
3. Atanas Bojaĝiev — Sumen
4. Nikolaj Bojaĝiev — Plovdiv
5. Emil Ĉirpanski — Dospat
6. Svoboda Damjanova — Kazanlâk

10. Ĥristo Dimitrov — Kubrat
11. Ĥristo Dolĉinkov — Târnovo
12. Neno Janev — Gabrovo
13. Ivan Liŝev — Trojan
14. Ĥristo Mamolov — Polski Trâmbeŝ
15. Bojĉo Mladenov — Vraca
16. Stojan Moraresku — Sofio
17. Dimo Trudoljubov — Jambol
18. Metodi Popov — Kjustendil
19. Stefan Popov — Ruse
20. Nikola Uzunov — Ĥaskovo



PAZARĜIK POST UK EN VARNO

Post la 63 UK de E-o, en Pazarĝik montriĝis pli vigla intereso al la Internacia Lingvo.

La 4 de oktobro en la E-klubejo okazis solena malfermo de la nova lernoĵaro. Al la kunvenintoj kore salutparolis la sekretario de la societo Pejo Peev. La sekretario de DK de BEA Petko Arnaudov prelegis pri la problemoj de internacia lingvo.

Tuj post la malfermo komenciĝis civitana kurso por komencantoj kun 45 partoprenantoj. La kursgvidantino estas la ĵus diplomita en Burgas E-instruistino Magdalena Georgieva. La kurso funkcias dufoje semajne kaj daŭros kvin monatojn.

Je la sama dato en lernejo „Ĥristo Bo-tev“ — Pazarĝik la societo malfermis elementan kurson kun 15 partoprenantoj (triklasanoj). Ĝin gvidas la infaninstruistino Mimi Peeva. La kurso funkcias unufoje semajne.

La 24 de oktobro en la E-klubejo okazis postkongresa vespero. Pri UK en Varno parolis Petko Arnaudov. Poste li rakontis al la ĉeestantoj pri la granda kuracefiko de la planto hipofeo, kiun unufoje prilaboris la merita agronomo de Sovetunio Sergej Krajnov. Antaŭ du jaroj li vizitis nian klubejon kaj montris al ni la planton, klarigante detale ĝian multflankan sanigefikon por la homa organismo. Ĉi-somere Krajnov alportis el Moskvo konfitaĵon el hipofeo. Arnaudov proponis al ĉiuj ĉeestantoj gustumi ĝin. Pri la diversflanke valora hipofeo S. Krajnov prelegis ankaŭ en la Somera Universitato en Varno.

Je la 26 de oktobro en la E-klubejo estis malfermita kurso por progresintoj kun 12 partoprenantoj. La kursgvidanto estas la ĵus diplomita en Burgas kiel E-instruisto Pejo Peev. La kurso funkcias dufoje semajne.

La Parolanta rondo funkcias ĉiumarde vespere.

Antaŭstaras malfermo de novaj kursoj.

Rosica Georgieva

ARANĜOJ POR NEESPERANTISTA PUBLIKO

Okaze de la 61-a jubileo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio E-societo „Espero“ en Loveĉ kaj la DE de BEA plivigligis sian agadon. Ni preparis du gravajn aranĝojn por la neesperantista publiko.

La 17-an de oktobro en la antaŭsalono de la plej vizitata kinejo „G. Dimitrov“ ni inaŭguris ekspozicion sub titolo „Naciaj kostumoj kaj vivmaniero de la popoloj“.

Per proksimume 500 bildkartoj sur 28 filatelaj kadroj estis montritaj naciaj kostumoj, moroj, kutimoj kaj momentoj el la folkloro kaj historio de popoloj el 30 landoj.

Tiu ĉi riĉa kolekto estas rezulto de multjara, persista kaj diligenta laboro de s-ano Ĥristo Dolĉinkov el Veliko Târnovo, kiu dum pli ol 20 jaroj korespondis kun geamikoj el ĉiuj partoj de la mondo, kolektante la interesajn objektojn.

Dum 10 tagoj multaj urbanoj kaj gastoj de Loveĉ ĝuis la ekspozicion kaj alte pri-taksis ĝin.

Alia aranĝo, kiun ni okazigis la 26-an de oktobro en la Distrikta Junulara Domo, estis vespero je temo „Ĉu ni konas Islandon?“ Impresojn kaj interesajn faktojn pri la malproksima lando rakontis kaj montris per bildoj la veterano Radoslav Triĉkov el urbo Vraca.

Dank'al E-o Triĉkov vizitis multajn landojn kiel delegito de kongresoj, konferencoj kaj festivaloj aŭ gaste al amikoj. Siajn veturojn li utiligas por popularigo de la paca kaj amikeca politiko de nia Popola Respubliko, por akiro de veraj amikoj al la bulgara popolo. Reveninte hejmen, per prelegoj kaj lekcioj tiu ĉi fervora propagandanto de la Internacia Lingvo rakontas al la bulgara junularo kaj civitanoj pri ĉio, kion li propraokule vidis kaj propre aŭdis, pri la vivmaniero, moroj, kutimoj kaj naturbelecoj de proksimaj kaj malproksimaj landoj kaj popoloj. Ĉi-vesper pluraj junuloj kaj plenaĝuloj aŭskultis kun granda intereso kaj scivolemo pri Islando — lando de kontrastoj.

Per tiuj ĉi aranĝoj, informojn pri kiuj aperis ankaŭ en la distrikta ĵurnalo „Zarja na Komunizma“ (Ĉielruĝo de la komunismo), nia E-societo faris bonan propagandon pri E-o kiel internacia lingva ligilo, kiel ilo de paco kaj amika kunlaboro inter la popoloj de la tuta terglobo.

Ilija Ivanov

ALVOKO

UNESKO proklamis la jaron 1979 kiel Jaron de la Infano. Lige kun tio en Pollando oni aranĝos grandan ekspozicion de la infana arto en la printempo de 1979. Ĉiuj e-istoj estas petataj kontribui por ties sukceso, instigante la infanojn, kiuj lernas E-on, sendi pentraĵojn, fotojn, afiŝojn kaj pri la temo «Infano — feliĉo — paco». Ĉiu sendanto nepre indiku sian aĝon, nomon, adreson, telefonon. Oni aljuĝos premiojn por la plej interesaj materialoj.

Ĉion oni sendu al adreso: Rondo de junaj esperantistoj ĉe Ŝtata Infan-domo en Gdansk — Orunia, str. Brzegi 55, Pollando.



Multnombra estis la familio de Izak Sasonov — kvin knaboj kaj tri filinoj. Ses el ili parolis E-on. La kvina ido David, karese nomata Davo, naskita la 24-an de decembro 1908, estis ankaŭ e-isto. Tiel studento



en la Libera Universitato en Sofio li aliĝis al BONSS (komuna unuiĝo de la progresemaĵ studentoj) malgraŭ la kontraŭstaro de la patro — konservativa hebreo, komercisto kaj rabeno samtempe.

Mi konatiĝis kun Davo post kiam li finis la gimnazion en Asenovgrad, kaj ni ofte promenadis en la antaŭmontoj de Rodopo. Afabla, bonkora, li impresis per sia klereco. Davo ofte vizitis min en mia loĝejo, kaj ni babilis pri arto kaj literaturo en la Internacia Lingvo.

Davo aĉetadis per propra mono lignosplitojn por hejti la ĉambron, en kiu li gvidis kursojn de E-o. Liaj kursanoj estis ĉefe laboristoj. Li estis bona pedagogo, kaj liaj kursanaj restis en la kurso ĝis la lasta leciono. Mul-

taj el ili ankoraŭ aktivas en nialanda E-movado.

Posedante perfekte la lingvon, Davo komencis traduki novelojn kaj rakontojn el la bulgara literafuro. Liaj preferataj aŭtoroj estis la majstro de la bulgara prozo Elin Pelin kaj la beletristo Petko Todorov. Siajn tradukaĵojn li sendis al la redakcio de gazeto „La Praktiko“, kiu volonte publikigis ilin. Ni ambaŭ tradukis la poemon „Septembro“ de Geo Milev, kaj ĝin aperigis la eldonejo „EKRELO“. Tiu fama poemo, gloranta la Septembran Ribelon de 1923 jaro, trovis sian internacian legantaron.

Kiam en la jaro 1929 fondiĝis la Bulgara Laborista E-Asocio (BuLEA), ni kun Davo fondis societon en Asenovgrad kaj komencis kunlabori al gazeto „Balkana Laboristo“.

Per siaj korespondaĵoj el eksterlando Davo senmaskigis la bulgaran faŝistan reĝimon. En la jaroj, kiam la bulgaraj militistoj febre sin preparis por milito kontraŭ Sovetio kaj la najbaraj landoj, Davo laboris en la urba packomitato. Li eldonis en E-o maneskribitan gazeton kun kontraŭfaŝisma karaktero.

Lia porpaca kaj porsocialisma agado tamen ne restis sekreto por la polico. Spionoj observis kaj denunciis lin. Iun matenon policianoj arestis Davon. Oni esploris lin per batoj. Li silentis. Ne povante pruvi lian „kulpon“, la faŝistoj ekzilis lin en malproksiman apudliman vilaĝeton, kie regis granda mizero. David malsatis kaj frostis.

La vilaĝestro tenis lin en moskeo per fera mano. Lia korpo ne havis pli da rezistofortoj. Li grave malsaniĝis, sed la vilaĝestro ne permesis venigi kuraciston el la proksima urbeto.

Jen kiel iu nekonata poeto priskribas lian „revenon“ hejmen:

Patrino grizhara eliris el domo.
Bukedon ŝi plektis, ekstaris ĉe l'pordo.
Polic' ŝin avertis matene: „La filo
vespere revenos jam el la ekzilo. . .“

La koro patrina jubilis dum tago.
Ŝi kukon preparis, dolĉaĵon kun fragoj;
kostumon, ĉemizojn, poŝtukojn ŝi gladis
kaj fine la ĉambrojn kaj korton balais.

Patrino do sidas ĉe l'sojlo de l'domo,
dum suno subiras skarlate fantoma.
Subite ŝi aŭdas, ke venas ŝargauto,
sin levas renkonti la filon amatan.

El aŭto descendas ŝofor', policano,
demetas kestegon kaj ambaŭ rikanas:
— Judino, renkontu la filon! Li venis!
Patrino brakumis la ĉerkon kaj svenis. . .

Tio okazis la 13-an de septembro
1942 jaro. Tiam David Sasonov estis
apenaŭ 34-jara!

Hr. M.

119a naskiĝtago de d-ro L. L. Zamenhof

L. L. ZAMENHOF NE ESTIS MONAVIDA

Pri tio ĉi ni scias el la sekvaj dokumentoj:

1. El la unua E-libro (26. 7. 1887), kie Zamenhof skribas: „La Internacia Lingvo, simile al ĉiu nacia, estas propraĵo socia, kaj la aŭtoro por ĉiam forcedas ĉiujn personajn rajtojn je ĝi.“

2. El letero de 9/21. 5. 1896 al Paul Nylen: „Kontraŭ la fakto, ke Vi ĉerpis el mia „Ekzercaro“ por Via lernolibro-ekzercaro mi absolute nenion havas. Kun plezuro mi permesas al vi preni el ĉiuj miaj verkoj tiom, kiom vi volas.“

3. El poŝtkarto de 12/24. IX. 1898 al A. Gaetano Coutinho, kie Zamenhof skribas: „Por traduki la „Ekzercaron“ en lingvon portugalan mi kun plezuro donas al vi mian plenan permeson.“

4. El poŝtkarto de 19 (27). 3. 1903 (poŝt-stampo) al René Deshayes: „Presigi la „Vojon“ Vi havas plenan rajton kaj Vi tute ne bezonas mian permeson pri tio ĉi.“

5. El letero de 20/V. 1905 al generalo Sébert: „Kun granda danko mi ricevis Vian leteron kun la sumo de 376 rubloj, oferitaj por mi de nekonata amiko, por faciligi al mi mian venon al la kongreso. Sed kvankam mi tre alte ŝatas la bonan amikan intencon de la nekonata oferinto, mi tamen tre bedaŭras, ke mi ne povas akcepti la

LA PREMIO SIMONDETTI

La Ornitologia Rondo Esperantlingva (ORE) disponas pri monsumo, per kiu ĝi povas rekompenci ĉiujare la plej bonan esperantlingvan tekston pri naturscienca temo. Por omaĝi al la unua prezidanto kaj kunfondinto de ORE., ing. Mario Simondetti, la premio nomiĝas „Premio Simondetti“.

La celoj de la premio estas:

— stimuli la verkadon de esperantlingvaj tekstoj pri la naturo;

— rekompenci la fervoron de verkintoj de tekstoj pri la naturo;

— propagandi por E-o en natursciencaj kaj naturamikaj medioj;

— havigi al la revuo „La Mevo“ konstantan provizon de valoraj artikoloj;

— pligrandigi la famon kaj pozicion de ORE.

Por 1978 j. la unuan premion en la konkurso gajnis nia s-anino RAJNA KONS-TANTINOVA el Sofio pro sia verko „Mia verda papageto“.

Tlian premion gajnis s-anino NADJA JEJ-NOVA el Softio pro sia rakonto „Cikoniaj leĝoj“.

Ni kore gratulas niajn samideaninojn kaj deziras al ili plurajn sukcesojn sur la literatura kampo!



nenian laboron kaj nenian publikan aprobadon aŭ respondecon, kaj kvankam mi havis plenan rajton akcepti la proponatan pagon, — mi tamen ĉiam rifuzadis.“

7. El letero de 18. 7. 1905 al „Tre estimata Sinjoro“: „Akceptu mian plej koran kaj sinceran dankon pro via propono pagi al mi la koston de mia vojaĝo. Volu tamen pardoni al mi, ke mi tiun proponon *ne* povas akcepti. Mi tre alte ŝatas Vian bonan deziron, sed mi sentus min tre nebone, se mi vojaĝus ne per mia propra mono.“

8. El letero de 18. 7. 1905 al Bourlet: „Al s-ro Breton mi respondis hodiaŭ, ke por lia deziro pagi al mi la kostojn de vojaĝo mi lin kore dankas, sed ke akcepti tion ĉi mi ne povas, ĉar mi sentus min tre nebone, se mi vojaĝus ne per mia propra mono.“

9. El poŝtkarto de 22. 1. 1906 (poŝtstampo) al E. Lawrence: „Por presi la kantojn, mi de mia flanko, kompreneble, donas al Vi plenan permeson.“

10. Je la 15. X. 1906 Zamenhof estis en Bruselo kaj je la 17—23. X. 1906 en Parizo, por en Bruselo kun Charles Lemaire kaj en Parizo kun Emile Javal diskuti demandon pri reformoj de E-o. La 23-an de oktobro 1906 Lemaire france skribis al Javal: „Zamenhof foriris. Mi estis korpemita, vidante foriri — tiel perditan en la vasta mondo — tiun Duon-Kriston. Li ne volis, ke mi provizu al li seĝon en la luksa trajno ĝis Berlino. Li foriris, en sia humila triaklasa kupeo, kun bombonoj por sia eta filino kaj du briĉoj por si. Mi opinias, ke li donis al ni admirindan ekzemplon.“ („La nica literatura revuo“, n-ro 21, jan.-febr. 1959, p. 83).

11. En la UK de E-o en Barcelono, Hispanujo, 1909, d-ro Henri Dor parolis, ke la genia kreaĵo de d-ro L. Zamenhof efektive helpas al la homaro forigi militojn, kaj proponis al la kongreso klopodi, ke Zamenhof ricevu Nobel-premion de paco. Zamenhof tre dankis pri la propono de d-ro Dor, sed petis, ke la kongreso ne prezentu tiun proponon kaj ne enskribu ĝin en la protokolon. (Lingvo Internacia, n-ro 189, sept. 1909, p. 427).

12. El poŝtkarto de 26. 11. 1909 al „Kara Kolego“: „El la „Proverbaro Esperanta“ Vi povas preni por la vortaro kiom Vi volas.“

13. El letero de 31. 7. 1911 al generalo Sébert: „Pagon por mia vojaĝo mi, kompreneble, *ne* prenos; mi nur akceptas (konforme al la ĝisnunaj tradicioj de niaj kon-

greso), ke en la kongresa urbo mem mi kaj mia edzino estos gastoj de la kongreso kaj ne pagos por nia loĝado kaj manĝado. Miaj filo kaj filino, kompreneble, *ne* estos gastoj de la kongreso; por iliaj kongresaj kartoj, kiel ankaŭ por ilia loĝado, manĝado ktp. mi pagos mem.“

14. El letero de 27. XII. 1912 al BEA: „Preni ian pagon pro la frazoj, kiujn fraŭlino Freyer ĉerpis el mia Ekzercaro por sia lernolibro, mi absolute *ne* konsentas. Mi kore dankas la konsilantaon de Via Asocio pro ĝia decido sendi al mi pagon, sed tiun pagon mi akcepti ne povas.“

15. El poŝtkarto de... al...: „La artikolo „Esenco kaj Estonteco de la ideo de Lingvo Internacia“ estas verkita *ne* de s-ro de Beaufront, sed de mi (sed mi deziras, ke ĝi restu *anonima*). Kun plezuro mi donas al Vi plenan permeson represi ĝin kune kun rusa traduko en Via verko. Ankaŭ mian „Preĝon“ mi kun plezuro permesas al Vi represi.“ (La poŝtkarto estas en la libro „Adolf Holzhaus. Zamenhof leteroj“, n-ro 355).

16. E. Privat en „Vivo de Zamenhof“, 1920, p. 92, rakontas: „Klientoj pagis nur kvardek kopekojn — kelkaj eĉ nenion.“

17. N. B. Havkin en sia artikolo „Aleksander Silberniki“ skribas: „La malriĉaj klientoj ekkonis la bonkorecon de la doktoro, kiu ofte kuracis senpage.“ („Esperanto Internacia“, n-ro 10, okt. 1946, p. 150, 151).

18. Kazimierz Tyminski ĉeestis la enterigon de d-ro Zamenhof. En artikolo „Ĉe la tombo“ li skribas: „Malantaŭ la ĉerko formiĝis multnombra sekvantaro, kiu grandparte konsistis el popolamaso, loĝanta en la hebrea kvartalo; videble la onidiroj pri tio, ke la Majstro senpage kuracis kaj helpis malriĉulojn, estas pravaj.“ („Pola Esperantisto“, n-ro 2, marto-aprilo 1956, p. 2).

19. Anatolo Koŝ en „Miaj rememoroj pri d-ro Zamenhof“ rakontas: „D-ro Zamenhof estis la sola varsovia kuracisto, kiu dediĉis unu tagon semajne por senpaga akcepto de malriĉaj malsanuloj.“ („Nuntempa Bulgario“, n-ro 12, dec. 1958, p. 22).

20. Emilian Loth en siaj „Rememoroj pri Zamenhof“ skribas: „Zamenhof ne estis materialisto kaj kiel okulkuracisto li ofte kuracis malriĉulojn tute senpage.“ („Pola Esperantisto“, n-ro 6, nov.-dec. 1959, p. 4).

Adolf Holzhaus

GRAVA POR FILATELISTOJ

La filatela sekcio de Helena E-Asocio intensas organizi internacian filatelan „ludon“ inter la e-istoj de la tuta mondo. Temas pri interŝanĝo de ĉirkaŭiraĵoj enhavantaj diversajn adresojn. La partoprenontoj devas obei nur du kondiĉojn: 1) La leterkoverto devas havi almenaŭ tri pm.; 2) Oni devas resendi

la ĉirkaŭiraĵon al la sekvanta adreso almenaŭ unu semajnon post la ricevo.

Per simpla maniero oni povos kolekti multajn pm kaj altiri novajn filatelamikojn, ankaŭ novajn amikojn de E-o.

Por pliaj informoj skribu al: Alekos Fragias, Figalias 5, Nea Kifisia, Ateno, Grekujo.



KONSTITUCIO

DE UNIO DE SOVETAJ SOCIALISMAJ RESPUBLIKOJ

(Daŭrigo el n-ro 11)

Ĉapitro 7

LA ĈEFAJ RAJTOJ, LIBEROJ KAJ DEVOJ DE LA CIVITANOJ DE USSR

Artikolo 45. La civitanoj de USSR havas la rajton pri klerigo.

Tiu rajto estas garantiata per senpageco de ĉiuj specoj de klerigo, per efektivigado de universala deviga meza klerigo de la junularo, per vasta disvolvo de profesiteknika, meza speciala kaj supera klerigo surbaze de interligo de la instruado kun la vivo, kun industrio; per disvolvo de koresponda kaj vespera klerigo; per disponigado de ŝtataj stipendioj kaj privilegioj al lernantoj kaj studentoj, per senpaga disdonado de lernejoj, lernolibroj; per eblo esti instruata en lernejo en la gepatra lingvo; per kreado de kondiĉoj por aŭtodidaktiko.

Artikolo 46. La civitanoj de USSR havas la rajton pri uzado de kulturatingoj.

Tiu rajto estas garantiata per komuna atingeblo de la valoroj de la patria kaj monda kulturo, estantaj en la ŝtataj kaj sociaj fondusoj; per disvolvo kaj proporcia lokigo de kultur-klarigaj institucioj sur la teritorio de la lando; per disvolvo de televido kaj radio, de libroeldonado kaj de gazetaro, de senpaga bibliotekaro; per vastigo de kultura interŝanĝo kun eksteraj landoj.

Artikolo 47. Al la civitanoj de USSR, konkorde kun celoj de komunisma konstruado, estas garantiata la libero de scienco, teknika kaj arta kreado. Ĝi estas garantiata per vasta disvolvo de sciencaj esploroj, per inventa kaj raciiga agado, per disvolvo de literaturo kaj arto. La ŝtato kreas por tio necesajn materialajn kondiĉojn, subtenas libervolajn societojn kaj kreaĵojn, organizas enigon de inventoj kaj raciigaj proponoj en la popolan mastrumadon kaj aliajn vivosferojn.

La rajtoj de aŭtoroj, inventistoj kaj raciigistoj estas defendataj fare de la ŝtato.

Artikolo 48. La civitanoj de USSR havas la rajton partopreni administradon de ŝtataj kaj sociaj aferoj, en diskutado kaj akcepto de leĝoj kaj decidoj de tutŝtata kaj loka graveco.

Tiu rajto estas garantiata per ebleco baloti kaj estielektata en la sovetojn de popolaj deputitoj kaj aliaj elektataj ŝtataj institucioj, partopreni tutpopolajn diskutojn kaj voĉdonadojn, popolan kontrolon, laboron de ŝtataj institucioj, sociaj organizaĵoj kaj organoj de socia iniciato, kunvenojn de laborkolektivoj kaj laŭ loĝloko.

Artikolo 49. Ĉiu civitano de USSR havas la rajton prezenti al ŝtataj institucioj kaj sociaj organizaĵoj proponojn pri plibonigo de ilia agado, kritiki mankojn en la laboro.

La funkciuloj devas dum fiksita tempo analizi la proponojn kaj petskribojn, respondi ilin kaj uzi necesajn rimedojn.

Persekuto pro kritiko estas malpermesata. Personoj, persekutantaj pro kritiko, estas submetataj al respondeco.

Artikolo 50. Konforme al la interesoj de la popolo kaj por la celoj de fortikigo kaj disvolvo de la socialisma reĝimo, al la civitanoj de USSR estas garantiataj la liberecoj: de la parolo, de la presado, de la kunvenoj, de la mitingoj, de la stratprocesioj kaj demonstracioj.

Efektivigo de tiuj politikaj liberecoj estas garantiata per disponigado al la laboruloj kaj al iliaj organizaĵoj de sociaj domoj, de stratoj kaj placoj, per vasta informado, per eblo uzi gazeton, televidon kaj radion.

Artikolo 51. Konforme al la celoj de komunisma konstruado, la civitanoj de USSR havas la rajton unuiĝi en sociajn organizaĵojn, akcelantajn disvolvigon de politika aktiveco kaj iniciatemo, kontentigon de iliaj diversformaj interesoj.

Al la sociaj organizaĵoj estas garantiataj kondiĉoj por sukcesa plenumo fare de ili de siaj sociaj taskoj.

Artikolo 52. Al la civitanoj de USSR estas garantiata la libero de konscienco, tio estas rajto konfesi ajnan religion aŭ konfesi neniun, plenumi religiajn ritojn aŭ fari ateisman propagandon. Ekscitado de malamikeco kaj malamo lige kun religiaj kredoj estas malpermesata.

En USSR la eklezio estas apartigita de la ŝtato, kaj la lernejo — de la eklezio.

Artikolo 53. La familio estas defendata de la ŝtato.

La geedziĝo estas bazita sur libervola konsento de viro kaj virino; la geedzoj estas plene egalrajtaj en la familiaj rilatoj.

La ŝtato zorgas pri la familio pere de kreado kaj disvolvo de vasta reto de infanejoj, per organizado kaj perfektigado de la servoj de ĉiutaga vivaranĝo kaj socia nutrado, per pagado de subvencioj pro nasko de infano, per disponigado de subvencioj kaj privilegioj al multinfanaj familioj, kaj ankaŭ de aliaj specoj de subvenciado kaj helpo al la familio.

Artikolo 54. Al la civitanoj de USSR estas garantiata netuŝebleco de la persono.



Neniu povas esti arestita alie ol laŭ juĝ-decido aŭ laŭ sankcio de prokuroro.

Artikolo 55. Al la civitanoj de USSR estas garantiata netuŝebleco de la loĝejo. Neniu rajtas sen leĝa bazo eniri loĝejon kontraŭ la volo de la loĝantaj en ĝi personoj.

Artikolo 56. La privata vivo de la civitano, sekreto de la korespondado, de la telefonaj interparoloj kaj de la telegrafaj komunikoj estas defendata de la Leĝo.

Artikolo 57. La estimo al la persono, defendo de la rajtoj kaj liberecoj de la civitanoj — estas devo de ĉiuj ŝtataj institucioj, sociaj organizaĵoj kaj funkciuloj.

La civitanoj de USSR havas la rajton pri juĝa defendo kontraŭ atencoj al ilia honoro kaj digno, vivo kaj sano, al persona libereco kaj havaĵo.

Artikolo 58. La civitanoj de USSR havas la rajton plendi kontraŭ agoj de funkciuloj, de ŝtataj kaj sociaj institucioj. La plendoj devas esti esplorataj laŭ ordo kaj dum tempo, fiksita de la Leĝo.

Agoj de funkciuloj, faritaj kun malobservo de la Leĝo, kun trouzo de la rajtoj, damaĝantaj la rajton de civitanoj, povas esti priplendataj antaŭ juĝistaro laŭ la ordo, fiksita de la Leĝo.

La civitanoj de USSR havas la rajton pri rekompenco de damaĝo, farita pro negaĵaj agoj de ŝtataj kaj sociaj organizaĵoj, kaj ankaŭ de funkciuloj, plenumantaj siajn oficajn devojn.

Artikolo 59. Plenumado de rajtoj kaj liberecoj estas nedisigebla de plenumado fare de la civitano de siaj devoj.

La civitano de USSR devas observi la Konstitucion de USSR kaj la sovetaĵajn leĝojn, estimi la regulojn de socialisma kunvivado, digne porti la altan titolon de la civitano de USSR.

Artikolo 60. La devo kaj honorafero de ĉiu laborkapabla civitano de USSR — estas konscienca laboro en elektita de li sfero de sociutila agado, observado de labora disciplino. Evitado de sociutila laboro estas

malkongrua kun la principoj de la socialisma socio.

Artikolo 61. La civitano de USSR devas gardi kaj plifirmigi la socialisman havaĵon. Devo de la civitano de USSR estas lukti kontraŭ ŝtelado kaj malŝparado de la ŝtata kaj socia havaĵo, zorge rilati al la popola bonhavo.

Personoj, atencantaj kontraŭ la socialisma havaĵo, estas punataj laŭ la Leĝo.

Artikolo 62. La civitanoj de USSR devas gardi la interesojn de la Soveta Ŝtato, akceli plifortikigon de ĝia potenco kaj aŭtoritato.

Defendo de la socialisma Patrio estas sankta devo de ĉiu civitano de USSR.

Perfido kontraŭ la Patrio estas plej granda krimo antaŭ la popolo.

Artikolo 63. Armea servo en vicoj de Armitaj Fortoj de USSR — estas honora devo de la sovetaĵaj civitanoj.

Artikolo 64. Devo de ĉiu civitano de USSR estas respekti la nacian dignon de aliaj civitanoj, plifirmigi la amikecon inter la nacioj kaj popoloj de la soveta multnacia ŝtato.

Artikolo 65. La civitano de USSR devas respekti la rajtojn kaj laŭleĝajn interesojn de la aliaj personoj, esti netolerema al kontraŭsociaj agoj, ĉiurimede akceli gardadon de la socia ordo.

Artikolo 66. La civitanoj de USSR devas zorgi pri edukado de la infanoj, prepari ilin por sociutila laboro, kreskigi ilin indajn anoj de la socialisma socio. La gefiloj devas zorgi pri la gepatroj kaj helpi ilin.

Artikolo 67. La civitanoj de USSR devas gardi la naturon, protekti ĝiajn riĉaĵojn.

Artikolo 68. Zorgo pri konservado de historiaj monumentoj kaj aliaj kulturaj valoroj estas devo de la civitanoj de USSR.

Artikolo 69. Internacia devo de la civitano de USSR estas akceli la disvolvigon de amikeco kaj kunlaborado kun la popoloj de la aliaj landoj, subtenon kaj plifirmigon de la universala paco.

NI RECENZAS

ALLOGA BUKEDO

Post la prezento en E-traduko de ok slovakaj verkistoj en la malgranda kolekto „Kanto super la lulilo“ kaj de slovakaj popolaj kantoj en la kolekto „Bukedo de slovakaj popolaj kantoj“ la slovakaj e-istoj

* *Slovaka Antologio, Pedagogia Eldonejo, Bratislava, 1977.*

prezentis en 1977 j. al la monda publiko novan imponan eldonon — „Slovaka Antologio“*. Tio estas bunta elekto el la plej valoraj verkoj de la slovakaj literaturistoj ekde la IX-a jc. de nia epoko, kiam la slovakaj nacio la unuan fojon anoncis sin per skribita vorto, ĝis la nunaj tagoj.



Sur siaj 544 paĝoj la antologio donas trarigardon de la literaturo de unu malgranda nacio, vivanta en la koro de Eŭropo, kiu devis trairi komplikajn vojon en sia historio kaj simile al la bulgara popolo devis sperti la amaran sorton de longega fremda jugo (pli ol mil jaroj).

Post la 17-paĝa enkonduka studo „La slovaka literaturo en kunligo kun la mondo“ de la elektinto de la verkoj, Jozef Vel'ky (Veljki), estas prezentitaj verkoj de 89 plej elstaraj aŭtoroj — prozistoj, poetoj, eseistoj kaj literaturaj kritikistoj. Estas inkluditaj ankaŭ pecoj el la riĉa slovaka folkloro, enkondukita per dupaĝa eseo pri la slovakaĵoj. La fikcio estas prezentita per rakontoj kaj fragmentoj el romanoj kaj noveloj. Pri ĉiu aŭtoro estas koncizaj notoj pri liaj/ŝiaj vivo, agado kaj verkaro, verkitaj de Jozef Vel'ky. Estas donitaj ankaŭ la portretoj de la plimulto de la verkistoj el la deknaŭa kaj dudeka jarcentoj, desegnitaj de L'udovit Ileĉko.

La verkoj estas aranĝitaj kronologie. La antologio komenciĝas per tri ĉapitroj el „La vivo de Konstanteno—Cirilo“ (la inventinto de la slava alfabeto kaj fondinto de la slava literaturo), verkita supozeble de la bulgaro Klemento, disĉiplo de la fratoj Kirilo kaj Metodio.

La enkonduka eseo de Jozef Vel'ky kaj la eseo de la plej elstara slovaka literatura kritikisto Aleksander Matuška (1910—1975) „La spirito de la slovaka literaturo“ donas la ŝlosilon por korekta kompreno de la slovaka literaturo, kiu, kiel indikas A. Matuška, havas defendan karakteron, ĉar la tuta vivo de la slovakoj prezentas senĉesan batalon por nacia konserviĝo.

Kompilita kaj aranĝita tiumaniere, la antologio donas sufiĉe plenan bildon de la slovaka literaturo kaj imagon pri ties loko en la monda literaturo. Samtempe ĝi havas konigan karakteron pri la vivo, la bataloj kaj la spirito de la slovaka popolo, „travivinta grandan parton de sia ĝisnuna historio en politika kaj socia mallibereco, vivinta malantaŭ la dorso de eŭropa civiliza procezo kaj malfruiginta ĉiudirekte“ (A. Matuška, p. 427). La leganto akceptas ĝin kiel „florbukedon“, kiu ĝojigas la koron.

Per tiu ĉi antologio la traduka literaturo en E-o estis konsiderinde riĉigita. Al la kolierio de naciaj antologioj en E-traduko aldoniĝis nova perlo. Pere de E-o la plej valoraj verkoj de la slovaka literaturo jam fariĝis tutmonda posedaĵo, kio estas tre grava por popolo kiel la slovaka, kies lingvo ne apartenas al la monde disvastigitaj. La antologio estis akceptita kun granda intereso de la legantaro, pri kio atestas la fakto, ke ĝi elĉerpiĝis tre rapide.

La tradukojn faris kolektivo el sep elstaraj tradukintoj: Jiří Kořínek, Štefan R. Seeman, Pavel Rosa, Magda Šaturova—

Seppova (ŝi estas ankaŭ la redaktorino), Miloš Lukač, Eduard V. Tvarožek kaj Jan Valaštan-Dolinský. La tradukado de beletraj verkoj kaj speciale de poeziaĵoj ne estas facila tasko, tamen la tradukintoj entute plenumis ĝin sukcese.

La traduko de la prozaĵoj estas en bona Esperanta stilo. Estas tamen iuj mankoj, pri kiuj mi konsideras necesa atentigi. Tia manko estas ekzemple la erara uzo de iuj formoj kiel: „rakontaĵo“ (rakonto — en la senco de literatura ĝenro), „konatulo“ (konato), „trovitulo“ (trovito), „tradukaĵo“ (traduko), „debutaĵo“ (debuto), „imagaĵo“ (imago), „svet-ro“ (svetero), „koprodukcio filmo“ (kunproduktita filmo), „revoluciula temo“ (revolucia temo), „protekcio“ (protekt/ad/o), „ĉagrenigi“ (ĉagreni) ka. Estas ankaŭ kelkaj slovakismonoj: „nombra“ (multnombra), „krucifikso“ (la vorto estas uzita kiel interjekcio, sed ĝi, laŭ PIV, signifas „ligna, ebura aŭ metala portebla bildo de Jezuo krucumita“) ka. La vorto „dratumisto“, kiu estas laŭlitera traduko de la slovaka vorto „drotar“, ne estas komprenebla al la fremdlandaj legantoj sen klarigo. La neologismoj en la tradukoj de la prozaĵoj ne estas multaj. Mi montros nur unu: „darfi“, kiu devenas el la prezenca formo de la germana verbo „dürfen“, uzata kun la „a“ signifo de „povi“ laŭ PIV — havi la permeson, la eblecon fari ion. Mi konstatis, ke la slovakaj e-istoj uzas regule tiun ĉi vorton. Sed tiuj ĉi mankoj tute ne malpliigas la kvaliton de la traduko.

La mankoj en la traduko de poezio tamen estas pli seriozaj. Kiel ĉefan mi povas montri la oftan neglekton de la ritmo, kiu estas grava komponanto de la E-metrikado. Eble tio ĉi ŝuldiĝas al la koncepto de la tradukintoj pri la ritmo. Laŭ miaj konoj la slovakaj ritmoreguloj estas la samaj kiel la Esperantaj.

Alia manko estas la uzo de nelogika vortordo. Estas okazoj de misuzo de la libereco de la Esperanta vortordo eĉ spite al iuj rigoroj reguloj tiurilate. Jen kelkaj ekzemploj „lian oni fermis en la kel'hakilon“ (p. 127); „dek du en distriktoj blanka tag' ekstaras“ (p. 125); „plugas kaj rikoltas ni sole kampojn“ (p. 118); „vidis ni de mortabismo/vivi vin en komunismo“ (p. 489) ka.

En la unuaj du ekzemploj la vortordo malhelpas la facilan perceptron de la penso. En la tria ekzemplo la loko de la adverbo „sole“ donas al la frazo signifon malsaman de tiu en la originalo. La vortordo en la lasta versparo kaŭzas malklarecon de la frazo.

Estas okazoj de neklara traduko, kiu malhelpas la perceptron de la senco. Tiaj estas la tria kaj la kvara strofoj en la traduko de la versaĵo „Slovaka panoramo“ de Pavol Horov, faritaj de Jiří Kořínek

(Jirĵi Korĵinek) kaj de iuj versoj el la bela poemo „Marina“ de Andrej Sládkovič, tradukita de la sama tradukinto, kiel jenaj:

„Estas juneco sopir' je belo,
de voĉ' ĉiela eĥo sur tero
animojn sankte agita,
estas potenc' ĝi gloron serĉema,
estas amflora ĝarden' edena,
anĝel' de polvo kovrita!“ (p. 117);

„Min per du bildoj ravas land' via,
du grandaj amoj la dono!“ (p. 116)

Krome, en la originalo de la citita poemo estas ege trafaj komparoj, kiuj en la traduko mankas.

La strebo trafi rimojn kondukis iujn el la tradukintoj al la uzo de nekutimaj formoj kaj strangaj kunmetaĵoj, kiuj ofte estas sensecaj, ekz. „dukruco“ (p. 401) „turas“ (p. 401), „morta“ (p. 401) anst. mortinta, „postsojlaĝo“ (p. 401), „snaktfiguroj“ (p. 127), „bonnokton“ (p. 127), „zonumo“ (p. 128) anst. simple „zono“, „rozo ruĝeflora“ (p. 127), „dancartas“ (p. 125), „ruĝo rubanda“ (p. 119) anst. ruĝa rubando, „belo-beboj“ (p. 116), „nub-oro“ (p. 115) anst. ora nubo, „flamigoj“ (p. 115) anst. flamoj, „flanken gvata“ (p. 118) anst. flanken gvatante, „beateco“ (p. 119) anst. felico, „plan-inundojn“ (?) (p. 489), „bakfarunaĵo“ (p. 494) anst. bakita farunaĵo, „ĉien disflugas laŭ abelaro“ (ili disflugas al ĉiuj flankoj kiel abeloj) ka. Pro la rimo kelkfoje estas ŝanĝita la senco de la frazo.

Ekz. „vilaĝo Detva“ en la poemo „Detvano“ de Andrej Sládkovič estas tradukita „Detva vilaĝana“ (p. 118).

Ne estas akceptebla la elizio de la vokalo „e“ ĉe la verbo estas en la verso „eble sopir' kun vi soli 'stas“ (p. 286). Ne estas rekomendinda ankaŭ la uzo de nenecesaj neologismoj kiel: olda, febla, frida, povra ka.

Pro ĉiuj ĉi mankoj la tradukita poezio perdis iom el la beleco kaj efikforto de la originalo. Tial mi opinias, ke se la antologio estus reeldonita, la tradukoj de multaj poeziaj verkoj nepre devas esti relaboritaj. Kiel modelajn tradukojn de poeziaĵoj mi montros jenajn: „La verda branĉo“ de Andrej Plavks (traduko de Pavel Rosa), „Anglg“ de Janko Kral (traduko de Pavel Rosa), „Al la samaĝuloj“ de Andrej Sládkovič (traduko de Jiří Kořínek) kaj „Super Tatro fulmas“ de Janko Matuška (traduko de Eduard Tvarožek).

Koncerne la elformadon de la libro oni devas diri nur laŭdajn vortojn. La preseraroj estas malmultaj. Necesas pli da klarigaj notoj kaj glosoj. Ekz. la vortoj „panduro“ kaj „krpco“ sen glosoj ne estas kompreneblaj por la fremdlanda leganto.

Ni tutkore gratulas la iniciatintojn, la kompilinton, la tradukistojn kaj la eldonejon pro la aperigo de tiu ĉi valora libro. Samtempe ni atendas novan, plibonigitan eldonon en pli granda eldonkvanto, kiu ebligas al pli multe da e-istoj havigi al si ekzempleron.

Dimitro Haĝiev

Ricevitaj en la redakcio

Internacia Pedagogia Revuo, n-ro 2, 1978, organo de Internacia Ligo de Esperantistoj-Instruistoj, redaktoro Gaston Turin, 43 rue E. Magnin, F-25300 Pontarlier, Francujo.

Budapeŝta Informilo, n-ro 9/1978, informilo de la Budapeŝta Teritoria Komitato de HEA (H-1443 Budapest, pf. 153, Hungario).

Norvega Esperantisto, n-ro 4/1978, organo de Norvega E-ligo (Vidar vik, NØkleveien 31, Oslo 6).

Svisa Esperanto Revuo, n-ro 6/1978, organo de Svisa E-Asocio (Schorenstrasse 32, 4900 Langenthal, Svislando).

Interlingvistika Informa Servo, n-ro № 3/1978, eldonata de Societo por Internacia Lingvo (Schaumanns Kamp 126, D 2057 Reinbek).

La Brita Esperantisto, n-ro 824/1978, eldonaĵo de Brita E-Asocio (140 Holland Park Avenue, London W11 4UF).

The Worker Esperantist, n-ro 291/1978, organo de Workers' Esperanto Movement (29 Farrance Road, Chadwell Heath, Essex, RM6 6EB England).

La migranto, n-ro 76/1978, eldonaĵo de la Turista Asocio „La naturamikoj“, E-Fako (fakreferantino Erna Döring, Spalenvorstadt 7, CH 4051, Bazelo, Svislando).

Le Travailleur Esperantiste (La Esperantista Laboristo), n-ro 33/1978, organo de la Fédération Esperantiste du Travail (179 rue Ordener, 75018 Paris, Francio).

Internaciisto, n-ro 9/1978, eldonaĵo de Kolektivo Esperantista Komunista (A-1100 Wien, Selma-Lagerlöfstrasse 23/6, Aŭstrio).

Paco, eldonaĵo de la MEM-Sekcio de GDR (DDR-108 Berlin, Charlottenstr. 60, Berlino).

Bulgarino, 1978, jara eldono de la Komitato de Bulgaraj Virinoj, luksa, aperanta en angla, franca, hispana, germana kaj Esperanto (bul. Patriarĥ Evtimi 82, 1000 Sofio, Bulgario).

Sciencaj komunikaĵoj 1978 — aldono de „Budapeŝta Informilo“, 100 paĝoj, prezo 40 F., mendebla je adreso: H-1443 Budapest, pf. 153.

La hardigado de la korpo — fonto de sano (praktikaj konsiloj) de Kiril Kalĉev, eld. de „Monda Turismo“, Sofio 1978, ofseta, 10-paĝa (apartaj konsiloj ankaŭ pri la banado en riveroj vintre, pri kio la aŭtoro estas tre kompetenta kaj fama kiel bulgara „rosmaro“). Adreso de la aŭtoro: Kiril Kalĉev, str. Dimitro Paŝkov 4-a, 5500 Loveĉ, Bulgario.



Distroĵ

POSTMILITA ANEKDOTO

En 1933, en Berlino, germana oficiro parolis al estra membro de la Brita Ambasadato kaj faris la strangan rimarkon, ke la britoj estas ĝentlemanoj, sed ke la francoj ne estas tiaj. Demandite, kion li volas diri, li klarigis:

„Nu, iutage en 1920 kelkaj personoj de la Internacia Milita Kontrol-Komisiono sub gvido de unu franca kaj unu brita oficiroj venis en la kazonon, de kiu mi estis la komandanto. Ili diris, ke ili havas kaŭzon opinii, ke mi kaŝas aron da pafiloj malantaŭ brikmuro, kontraŭe al la postuloj de la paca kontrakto.

Mi neis tion kaj donis mian honorvorton kiel germana oficiro, ke mi ne kaŝas pafilojn en la kazono.

Nu, via brita oficiro estis ĝentlemano: li akceptis mian honorvorton kaj foriris. Sed la franca oficiro ne estis ĝentlemano, li ne volis akcepti mian honorvorton. Li detruis la brikmuron kaj forprenis miajn pafilojn. . .“

El «Aŭstralia Esperantisto», junio 1977

LA RUZA KNABO

Jurgen estis kune kun sia partino ĉe onklo Maks. Kiam ili volis reveni, onklo Maks diris:

— Nu, Jurgen, ĉu vi ne deziras preni plenmanon da nuksoj?

Jurgen silentis.

— Nu prenu, knabo!

Jurgen metis la manojn malantaŭ la dorson kaj rigardis la nuksojn.

— Jen, knabo! — diris onklo Maks kaj metis plenmanon da nuksoj en lian poŝon.

Sur la strato la patrino demandis mirigite:

— Sed, Jurgen, kial vi ne volis preni nuksojn, vi ja manĝas ilin kun plezuro?

— Jes, sed la mano de onklo Maks estas ja multe pli granda ol la mia, — respondis la ruza knabo.

LA KAROTOJ HELPAS

Konversacio inter du amikoj.

La unua: — Vi opinias, ke karotoj helpas por plibonigo de la vidkapablo?

La dua: — Kompreneble! Ĉu vi vidis iam ajn leporon porti okulvitrojn?

FAMAJ MORTINTOJ

Kiam la transoceana ŝipo alnaĝis en la havenon de Nov-Jorko, iu usonano atentigis fiere francan vojaĝanton pri la Statuo de la Libereco. La franco okulfiksis la statuon enpensigante kaj rimarkis:

— Ni ankaŭ starigas statuojn — por memorigi niajn eminentajn mortintojn.

KANGURUO (MAKROPO)

Kiam la unuaj eŭropanoj iris al Aŭstralio, ili vidis strangan beston. Kvankam kvarpieda, tiu besto marŝis per du gamboj. Antaŭ sia ventro ĝi havis sakon kiel poŝon. En tiu sako sidis malgranda ido.

— Kio estas tio? — demandis la eŭropanoj la nigrajn loĝantojn de la insula kontinento.

— „Kan-gu-ru“ — estis la respondo.

Kaj de tiam oni nomas tiun specon de sovaĝa besto kanguruo.

Pasis kelkaj jaroj. La eŭropanoj lernis la lingvon de la aŭstralianoj. Apenaŭ tiam ili eksciis, ke „kanguru“ en ilia lingvo signifas „mi ne komprenas“.

Solvo de la krucenigmo „5 literoj“

de G. Berezin, n-ro 5 de „BE“

Horizontale. 1. Marso. 4. Libro. 11. Etiko. 12. Krust. 13. Prezo.

Vertikale. 2. Atlas. 3. Sirok. 5. Impet. 6. Rapid. 7. Silab. 8. Porko. 10. Turne.

TRA LA GAZETARO

Ankoraŭfoje pri la bulgara gazetaro kaj la 63-a UK

En la duobla 8—9 n-ro de nia gazeto ni informis detale kiel la bulgara gazetaro, radio kaj televido informis pri la Kongreso. Ni resumis: 13 ĵurnaloj aperigis 39 artikolojn kaj informojn. Nun ni aldonas pliajn informojn:

La distrikta ĵ. „Sept-mvrijsko Zname“, u. Pazarĝik aperigis (29. VII) prikongresan artikolon de Petko Arnaudov.

Trikolumnan artikolon en ĵ. „Naroden Drugar“ u. Jambol (15. VIII) aperigis la ĵurnalisto-esperantisto Dimo Trudoljubov.

En la sama ĵurnalo la soveta verkistino-esperantistino Nadia Andrianova el Kiev aperigis en du numeroj (12 kaj 14. IX)

vojaĝimpresojn pri la kongresa lando, emfazante detale la kongreson mem.

En ĵ. „*Kom*“, u. Berkovica, Savka Goranova aperigis ampleksan artikolon sub la titolo „Impona forumo de la esperantistaro“ (15. IX).

La sama ĵurnalo aperigis (1. X) informon pri la kongresa poŝtmarko.

En la monata ilustrita revuo „*Sŭr m nna Bŭlgarija*“, eldonata en 4 lingvoj, aperis detala informo kun fotoj pri la Kongreso.

En la organo de la Asocio de Bulgaraj Filatelistoj „*Filatel n Pregl d*“ (n-ro 8) aperis informo kun bildo pri la Esperanta poŝtmarko, emisiita omaĝe al la 63-a UK.

La filatela periodaĵo „*Izvestija na Varnenskoto filatelno drufestvo*“, u. Varna (n-ro 9) dediĉis longan artikolon pri la filatela ekspozicio dum la Kongreso.

Do, ni denove povas sumigi: 21 bulgaraj periodaĵoj aperigis entute 55 artikolojn kaj informojn pri la 63-a UK de E-o.

En ĵ. „*Balkansko Zname*“ — u. Gabrovo (3. VIII): informo de Milka Janeva pri renkontiĝo de la e-istoj de Gabrovo kun e-istoj el Francio, Nederlando kaj Japanio, venintaj por la UK en Varno.

En la sama ĵurnalo kaj numero: informo de Polina Avramova pri renkontiĝo de la e-istoj de Gabrovo kun la 100-membra soveta delegitaro, veninta por la UK en Varna. Ambaŭ renkontiĝoj okazis en la Sindikata Kulturdomo.

En la sama ĵurnalo (10. VIII): informo pri la E-poŝtmarko kun ties foto.

En la sama ĵurnalo (24. VIII): granda raportaĵo de Milka Janeva pri la UK de E-o en Varno kun foto.

En ĵ. „*Impuls*“ — organo de la Ministerio de Komunikoj kaj CK de la Sindikato de Laboristoj el la Komunikoj (15. VIII): raportaĵo de Todorka Dunĉeva sub titolo „Internacia renkontiĝo de poŝtistoj“ — pri la faka kunveno de poŝtistoj en kadre de UK en Varno.

Alitemaj gazetmaterialoj

En ĵ. „*Sptemvrijska Pobeda*“, u. Pleven (20. VI): artikolo „E-o en la revoluciaj tradicioj de urbo Pleven“ de Nano Kjuĉukov, vicprezidanto de BEA.

En la sama ĵurnalo (6. VII): informo pri du solenaj celebroy memore al la falintaj en la antifaŝisma batalo herooj-esperantistoj Minĉo Kānev kaj Mladen Blaĵev.

En ĵ. „*Naroden Drugar*“, u. Jambol (20. VI): detala informo sur tri kolumnoj de Nikolina Genova pri la agado de la e-istoj en Jambol kaj la distrikto lige kun la Distrikta E-konferenco.

En ĵ. „*Sum nska Zarja*“, u. Ŝumen (22. VI): informo de I. Stilijanova pri regiona esperantista pedagogia konferenco.

En la sama ĵurnalo (15. VII) informo de Cvjatko Todorov pri gastado de ~~Sumen~~aj

e-istoj al la e-istoj de u. Debrecen, Hungario, ĝemela al Ŝumen.

En la sama ĵurnalo (19. VII) publikigita la letero de angla e-isto kun mencio de ĝia e-ista deveno.

En la sama ĵurnalo (28. IX): detala informo de Cvjatko Todorov pri gastado en Ŝumen de e-istoj el pli ol 10 landoj post la UK.

En la sama ĵurnalo (12. X): informo pri gastado de ŝumenaj e-istoj al la e-istoj en la ĝemeligita urbo Magdeburg (GDR).

En ĵ. „*Zarja na Komunizma*“ u. Loveĉ (6. VII): informo, ke baldaŭ eklaboros e-ista mezlernejana laborbrigado sur arkeologia objekto en v. Debnevo, distrikto de Loveĉ.

En la sama ĵurnalo (22. VII): ampleksa raportaĵo pri la ĉiutaga vivo de la e-ista mezlernejana laborbrigado en v. Debnevo. Verkis ĝin la ĵurnalisto Pejo Dulev.

En la sama ĵurnalo (26. IX) sub titolo „La modesta kontribuo de esperantisto“ — tre impresa skizo pri la e-isto-instruisto Ivan Stojanov el v. Slatina, distrikto de Loveĉ, de Ilija Ivanov.

En la sama ĵurnalo (19. X): informo pri ekspozicio en Loveĉ pri fotoj de popolkostumoj el 30 landoj, kolektitaj de la E-aktivulo Ĥristo Dolĉinkov el u. Târnovo.

Pro surstrata aŭtoakcidento pereis nur 30-jara nia fervora samideanino el u. Ŝumen



Katja Bojaĝieva

Brakuminte arde la homecajn ideojn de E-o pri paco kaj amikeco inter homoj kaj popoloj, ŝi energie laboris por altiro de la junularo al nia E-movado. Ŝi estis membro de DE de BEA en Ŝumen.

Niajn kondolencojn!
